

Interlingvistiko en la instru-sciencoj, temo de la internacia konferenco organizita de la Instituto de Pedagogio kaj Kibernetiko en Paderborn (24-28.11.1976)
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 688, 1976.12.15 & 17 & 18

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La lastan semajnon de novembro okazis en Paderborn, Germanio federala, tre interesa internacia konferenco sub la nebula titolo Interlingvistiko en Scienco kaj Klerigo. Ĝin organizis Instituto pri Kibernetika Pedagogio, kiun direktas doktoro Helmar Frank. Perfekte gvidis la tutan aranĝon sinjoro Hermann Behrmann. Mi estis invitita por prezenti en la kadro de tiu ĉi konferenco raporton pri la programita instruado de esperanto sub la titolo La apliko de la programita instruado en la planlingva instruado. Perradie ni jam aŭdigis al vi tiun ĉi raporton. Hodiaŭ ni liveros niajn impresojn pri la paderborna konferenco mem.

A.- La riĉega, ni eĉ diros tro riĉa programo, disvolviĝis kun perfekta akurateco. Seninterrompe sin sekvis dum kvar tagoj raportoj kaj prelegoj laŭ antaŭe anoncita horaro, kiu ne antaŭvidis diskutpaŭzojn.

Cl.- Persone mi estus preferinta iom malpli riĉan programon kun debatoj, ĉar multaj raportoj kaj prelegoj vekis en ni aron da demandoj aŭ da reagoj, kiujn ni devis nepre silentigi. La prezentado de la prelegontoj ne estis tre kontentiga : mankis minimumaj sciigoj pri la profesiaj kaj esperantistaj funkcioj kaj pri la vivo mem de la parolantoj, nur la loĝ-lokon ni sciis. Kiujn ni ne antaŭe bone konis, tiujn ni malfacile povis kontakti. La paderborna konferenco ne estis renkontiĝejo, kie oni vere intimiĝas kun la laboro kaj penso de kolegoj. Ĝi kontentiĝis doni al ni supervidon pri la hodiaŭa disvolviĝo de esperanto en scienco, tekniko, pedagogio kaj aliaj fakoj.

A.- Partoprenis la paderbornan konferencon du malsimilaj publikoj : unuflanke esperantistoj venis prezenti siajn malkovrojn aŭ raportoj pri sia aktiveco ; aliflanke ne esperantistaj universitatoj estis invititaj por prezenti prelegojn iel en rilato kun planlingvistiko kaj interlingvistiko. Ili sin ĝenerale esprimis germanlingve kaj rilate al esperanto iliaj kontribuajtoj plej ofte estis sufiĉe supraĵaj, ne sufiĉe dokumentitaj kaj us-modaj.

Cl.- En la paderborna Instituto pri Kibernetika Pedagogio la vorto esperanto estas ĝenerale forpelita profite al pli noblaj terminoj kiel Internacia Lingvo, planlingvo aŭ interlingvo. Tio ofte kondukas al intelekta konfuzo pli malpli serĉata por eble interesigi al esperanto la universitatan mondon. Anonci, ke oni konferencos pri interlingvistiko, donas pli bonan impreson, ol anonci konferencon pri esperanto.

A.- La du laborlingvoj de la konferenco estis do esperanto kaj la germana. Teknike ĉio estis tre bone aranĝita. Interna televida instalaĵo permesis al ĉiuj, kiuj ne komprenis la lingvon de la prelegisto, iri en alian salonon, kie interpretisto provis samtempe rediri en la alian lingvon, kion la prelegisto videbla ĉe la televida aparato, ĵus prezentadis. Temis pli pri resumoj ol pri kompletaj tradukadoj de la prelegoj. Tial, kvankam la samtempa interpretado funkciis ĝis la fino de la aranĝo, pli kaj pli etiĝis la nombro de ĝiaj profitantoj. Multaj preferis resti en la prelegejo en kontakto kun duonkomprenebla prelegisto, ol dependi de interpretista raporto. Aliaj forlasis la prelegojn por libere babili en la koridoroj.

Cl.- Venontan semajnon ni raportos pri la enhavo mem de la plej interesaj raportoj. Ni hodiaŭ jam diru, ke la prelegoj, kiujn faris fraŭlino Mas el Nancy, sinjoro Heinz Dieter Maas el

Saarbrücken kaj sinjoro Bruce Sherwood el Urbana, Usono, pri la temoj aŭtomata tradukado, sonanalizo kaj sinteza voĉo, estis veraj teknikaj regaloj.

A.- La tri prelegoj de doktoro Istvan Szerdahelyi, el Budapeŝto, alportis tre utilajn sciigojn pri la aktuala stato de interlingvistiko kaj pri la lingvodirektataj tendencoj nuntempaj.

Cl.- Pluraj prelegistoj raportis pri la kunordigitaj plurlandaj eksperimentoj pri esperanto-instruado. La unuan eksperimenton nuntempe analizas ĝuste doktoro Istvan Szerdahelyi kun siaj studentoj, la duan gvidas Helmut Sonabend, la prezidanto de ILEI.

A.- La konferencon konkludis beletraj prelegoj pri la traduksupereco de esperanto. Pri la tradukado de poezio kaj prozo tre interese raportis Richard Schulz el Minden, pri la traduko de kantoj Olivier Tzaut legis eseon de Claude Piron. Ĉar tiuj ĉi du lastaj estas svisoj, ni havos foje la eblon ilin rekte intervjui. Olivier Tzaut ilustris sian prelegon per tre variaj kantoj.

Cl.- Unu el la plej talentaj prelegistoj tutcerte estis la juna itala lingvisto doktoro Fabricio Pennacchietti, kiu instruas en la universitatoj de Torino kaj Venecio. Li ekzamenis, ĉu esperanto estas hindeŭropa lingvo kaj montris la gravecon de la influo de la de zamenhof parolataj lingvoj sur la vortformadon kaj frazkonstruon de la internacia lingvo.

A.- Instituto pri Kibernetika Pedagogio baldaŭ aperigos konferencan dokumenton kun la teksto de la ĵus aluditaj prelegoj kaj raportoj. Ĉiuj interesatoj pri la temo esperanto en scienco kaj klerigo nepre akiru tiun ĉi revu-numeron.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!